EKO

Esperiga Komuniko

Subtene al la loka, landa, faka kaj regiona agado

- AMO 63 progresas fulmrapide
- Jen la programo. Aldonu vin! Petu aliron!
- Kalkulu vian tempozonon
- Nia ĉina Landa Asocio laboras
- Iniciato pri virusa gvido por infanoj

Redaktoroj: Stefan MacGill, Mirejo Grosjean.

EKO 2020-13 sendita el Budapeŝto la 16an de aprilo (CEST 12h CEST)

Al: Komitato, sekcioj kaj aktivuloj de ILEI, Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en multaj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj. Pli ol 1500 ricevantoj.

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkroĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de ILEI kaj UEA

# AMO 63 V – LA PROGRAMO EN KONSTRUO !

Stato je apr 16, 10h CEST.

Tumultaj tagoj! Kiel solece ni povas sperti tiom da sprono kaj energio? La Landa Asocio de UEA en Irano (IREA) jam paŝis decide, por altigi la nombron da eblaj partoprenantoj de 100 ĝis 500, pere de la aplikaĵo Zoom (Zomo).

Jen la nuna koncepto por la programo de la 63a AMO-seminario, la unua per virtuala livero, okazonta lige kun la irana kongreso. Programŝanĝoj ĉiam povas okazi. Jam estas atendovico por prezentantoj. Ĉio laŭ la iranaj horoj. Por aliaj tempozonoj, vidu sube.

Sabate, la 18a de aprilo, (15.00 – 18.45):

- 15.00 – 15.10 Malfermo kaj enkonduko (SMG) nur voĉe kaj ekrane.
- 15.15 – 16.00 Ahmad Reza Mamduhi: 'Kiel instrui Esperanton dum pandemio?'
- 16.15 – 17.00 Hamzeh Shafiee: 'La aplikaĵoj por virtuala babilado'.
- 17.10 – 17.50 Hamid Babadi Akasheh, prezidanto de IREJO, la irana sekcio de TEJO, 'Kiel maturigi aktivajn junulojn por la pandemio'
- 18.00 – 18.45 Humphrey Tonkin, dufoja prezidinto de UEA 'La esprimkapablo de Esperanto'

Dimanĉe, la 19a de aprilo, (15.00 – 18.45):

- 15.00 – 16.00 Mirejo Grosjean (dimanĉe): 'Limoj - en la ombro de migradoj kaj devigaj izoliĝoj.'
- 16.10 - 16.50 Jeremie Sabiyuma, estrarano de UEA pri AMO: 'La alvenanta defio'.
- 17.00 – 17.45 Katalin Kovats: 'La kontribuo de <edukado.net>.
- 17.50 – 18.40 Keyhan Saradpour: 'La rolo de UMEA en la nuntempo'.
- 18.40 – 18.45 Fermo kaj konkludoj (SMG)

Jen la plejlastaj informoj pri la seminario, en kiu ĉiu ajn povos partopreni. Por kunlabori, nur sendu mesaĝon al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com> por ricevi la alirkodojn.

# Tempozonoj:

Ĝis nun preskaŭ nur estraranoj de UEA, ILEI kaj aliaj internaciaj asocioj devis regi la tempozonojn – nun ĉiu devas tion fari. Jen gvidilo. Abundas retejoj, kiuj donos informojn, se ne aperas via tempozono. Jen la ŝlosilo, bazita sur la komenchoro de la seminario.

Irana tempo: ekde 15.00h

Centra Eŭropa Somera tempo: ekde 12.30h.

UTC (GMT), la normo bazita sur Greenwich: ekde 10.30h

Amerko: Orienta Somera Tempo (EDT): 06.30h

Jen la programo por la ligita irana kongreso: https://www.espero.ir/eo/kongresa-programo/

====================

# La ĉina Landa Asocio aktivas pri informado al ni

ĈEL ĉinigis la informon pri Esperanto en la tempo de viruso, kaj aperigis ĝin en ilia wechat-konto, https://mp.weixin.qq.com/s?__biz=MzAxOTEzMTk3NQ==&mid=2650543950&idx=1&sn=d87c8b65a9033fd2702cd3229c5c7dc4&chksm=83c30c66b4b48570a161142201bd0e1d0ac3d216cfd91a4364a26306ac76f4915ccacdcd6844&token=770643300&lang=zh_CN#rd

Chen Ji, Direktoro de Oficejo de Ĉina Esperanto-Ligo

vortoj: 595

# UMEA pluperas iniciaton el Strasburgo

La unua estas mallonga porinfana klarigo pri la nuna situacio rilate kun kronviruso (eĉ se la hejmrestaj kondiĉoj foje varias inter landoj). La originala rakonto estis verkita de franca instruistino.




============================

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado. La prezento estas ĝisdata ĝis 2019/15. Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro.

**ALDONU VIN**: Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj, ktp.

**SUBTRAHU VIN**: Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.